

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONA-HISPANUJO

A VIZO: La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezone la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendas.

ENHAVO: Originalaj Temoj. — La Sesa Kongreso. — Ĵaluza Malsano. — La Papilio. — Studkomisio pri ĉiulanda verkaro. — Elĉerpitaj sciigoj. — Kongreso de U. E. A. — EnlanMovado. — Bibliografio. — Korespondado.

ORIGINALAJ TEMOJ

DENOVE ni intencas atentigi la bonvolemajn legantojn pri la urĝa bezono krei en la esperantista popolo originalan literaturon. Ĝi estos unu el plej intimaj gloraj motivoj: ĝi honoros nian potencan rason, varmigis ĉiutempe la koron de la legantoj, almitos por niaj vicoj altvalorajn pionirojn kaj kunhelpos, de nun jam, al la vera triumfo ĉe la registaroj.

La simpatiaj Floraj Ludoj feliĉe enkondukitaj en niajn Universaliajn Kongresojn, la konkursoj ofte organizataj de tiu aŭ alia gazeto kune kun la iniciativo de multaj kaj la konstanta protektado de grupoj, redakcioj aŭ altaj institucioj: ĉiuj diritaj kaŭzoj tiamaniere favoras la kreon, kreskadon, eĉ riĉigon de nova originala literaturo, ke opinieble, baldaŭ nia ora sonĝo estos sukcese kronata per la plej rapida serio de definitivaj triumfoj.

Kaj por iomete kunlabori al tia nobla celo, oni al ni permesu skribi kelkajn vortojn pri temoj elektindaj, kvankam estos afero preskaŭ sen necesa.

Ni apartigu la gazetaron el la verkoj. Ĉar la gazeto devas esti legata sen profunda pripensado, ĝi povas nur enhavi simplajn skrib-

ajojn: historietoj, rakontoj, noveletoj, mallongaj priskriboj pri scienco, literaturo, arto, moralo, kutimoj. Rilate al la ĉiam alloga kiel neniam forlasebla poezio, la gazeto povas kaj devas ĉiunumere sin ornamati per lirika poezieto, ĉu sentema, ĉu sprita: nun priskribante ĉarman pejzaĝon, poste honorante la virton aŭ riproĉante la malvirton.

Koncerne apartajn verkojn tiel broŝurajn kiel volumajn, la originala teksaĵo povas aperi tre ampleksa, ĉiam nova, senfine alloga laŭ diversaj fontoj. Efektive, se la skribaĵo pritraktas didaktikan aferon, ĝia larĝa kampo estas la scienco, filozofio, historio, fiziko, naturhistorio, lingvistiko, matematiko, industrio.

Se ĝia celo estas moralo, tiam priskribos aferon dian, homan, socian. Fine, se la verko devas nur amuzi kaj ĝojigi la spiriton per la senĉese novaj ĉarmantaj kreaĵoj de la homa genio; ĝi povas kanti epikajn agojn de l'herooj, reprodukti por bonintenca moralo vivajn scenojn dramatikajn, aŭ laste, kanti ankaŭ, ne herooĵojn, sed lirikan belon tiel vaste dissemitan en la naturo. Tiuj lastaj priskriboj rilatas al kamparo, al monto, al rivero, al fonto, al arbaro, al valo, al birdoj, al bestoj, al fizikaj fenomenoj, al maro, al ĉielo.

Noveloj kaj priskriboj estas hodiaŭ la plej serĉataj verkoj. La reganta kiĥotismo precipe estas nuntempe la freneza tralegado de tutkoloraj noveloj. Nu, oni verku tiujn, historiajn, imagajn, kutimajn; sed ĉiam kaj ĉie teksante la instruon aŭ plezuron kun la reĝino de la feliĉeco: la moralo. — Originalaj verkistoj inter aliaj: Pujulà, Leono Zamenhof, Vallienne, Dombrowski, N. Kolovrat, Boirac, Sentis, Moch, Tomič.

S. PUBILL SK.



LA SESA KONGRESO

JEN pasis La Sesa! La mondkongreso de la Esperantistoj en Usono jam fariĝas historio!

Je la kvara kaj duono posttagmeze, Sabaton la 13^{an} de Aŭgusto, alvenis ĉe la Washingtona stacidomo Dro. Zamenhof, lia viveca edzino; Kolonelo Pollen, prezidanto de la «Brita Asocio»; Sro. Mann, redaktoro de *Brita Esperantisto*; Sro. Rollet de l'Isle, de la «Scienca Asocio»; kaj aliaj esperantistaj eminentuloj.

Entuziasmege la ĉeestantoj laŭte ekkriis: «Vivu! Vivu Zamenhof!» Por la unua fojo en Usono oni aŭdis tiun vivigan krion.



LA KONGRESANOJ DE LA SESA INTERNACIA ESPERANTISTA KONGRESO

Preskaŭ la tuta de l'urbo esperantistaro iris renkonti la Majstron; inter aliaj: Dro. Yemans, vic-prezidinto de «Esperanto Asocio de Norda Ameriko»; Kapitano Perogordo, vic-prezidinto de l'«Kvina Kongreso»; Dro. Mybs, de la «Konstanta Komitato de l'Kongresoj»; Sro. Chavet, de la «Centra Oficejo»; kaj Gesinjoroj Reed, de l'«Organiza Komitato».

Post vespermanĝo ĉe l'hotelo Arlington, raportisto de ĉiutaga ĵurnalo *The Star* petis intervjuon.

«Tio, kio plej multe min impresis, tuj kiam mi metis piedon sur teron en la nova mondo,—diris la doktoro;—estas la sento de libereco, kiu kvazaŭ vibras en la aero usona kaj kiu aperas videble sur preskaŭ ĉiu vizaĝo, kiujn oni renkontas sur la stratoj. Ankaŭ min multe frapis la viva nerva energio, kiu evidente instigas ĉiun amerikanon.

»Estas por mi kvazaŭ tute nova lando, al kiu mi ankoraŭ ne tute alkutimiĝis. Nov-Jorko estas urbeĝo tiel kolosa, tiel dinamika, tiel tute malsimila ĝe kiu ajn eŭropa urbo, ke ĝi inspiras ĉe mi nevenkeblan miron.

»Kvankam la Esperantista Movado en Usono estas ankoraŭ tre juna, ĝi jam montras grandan vivpovon, kaj promesas vastan progresadon.

»Eble la plej grava faro por la disvastigado de nia afero estas la kuraĝigo kaj kora kunhelpado de la tutmonda gazetaro, kaj poste la simpatio kaj aprobo de ĉiuj lernejoj kaj kolegioj. Ke nia lingvo Esperanto tiom penetru en la lernejojn de Usono, kiel ĝi jam pli kaj pli penetras en multajn lernejojn en Eŭropo, tio estas la plej kara revo de nia tuta esperantistaro.»

Kompreneble Dro. Zamenhof parolis Esperanton. «Mia kono pri la angla estas teoria, — li diris angle, en la komenco de l'intervjuo, zorge elektante ĉiun vorton. — Mi ne povas interparoli per tiu lingvo. La vortoj venas tre malrapide. Mi preferas uzi mian propran.» Kaj, laŭ la raportisto, tion li tuj ekfaris, kun tiom da viveco kaj rapideco, ke Dro. Yemans, kiu tradukis, trovis malfacile sekvi lin.

Pli malfrue ĉe la hotelo okazis neformala akcepto, en kiu la delegitoj ekkonatiĝis unu kun la aliaj.

DIMANĈON 14^{an}

Ĉe la Episkopa preĝejo de Sta. Paŭlo, Pastro Paul F. Hoffman, el Baltimoro, legis Esperante la Diservon kaj la preĝojn; Pastro James L. Smiley, el Anapoliso, predikis. La Esperantistoj ĉeestis grandnombre kaj atente sekvis la respondojn en Esperanto. Dro. Smiley diris enparte: «Kiel la Romanoj estis forte antaŭenpuŝantaj de granda deziro progresi, pligrandigi ilian imperion, konstrui novajn vojojn, plivastigi la uzon de iliaj instruleĝoj, tiel same la moderna mondo senlace klopodas efektivi la aerflugadon, eltrovi ĉiujn sekretojn de la Naturo, kaj ricevi unu solan internacian lingvon — ĉio ĉi havanta la nepran tendencon starigi tuthoman interfratecon.»

Pro la foresto de Pastro Bianchini, el Italujo, la Katolikoj ne havis la proponitan Esperantan Diservon ĉe la Preĝejo de Sta. Patriko.

Vespere okazis koncerto ĉe la Arlington. Partoprenis Sino. F. A. Williams; el Wheeling, West Va.; Fino. Agnes Preston, el Riverdale, Md.; kaj Sro. Herbert Harris, el Portland, Me.; Fino. Cora S. Butler, el Nov-Jorko; kun mandolino; Fino. A. F. Mears, el Detroit, kun piano — solistoj. Kvarteto, konsistante el Sino. Williams, Fino. M. K. Anaker, el Pittsburg, Sroj. E. Newell, el Center Sandwich, N. H., kaj C. A. Wyrick, el Chicago, faris tre plaĉan impreson. Kantis Sino. Williams ankaŭ novan esperantan kanton, *L'Ekzilo*, kiu komponis Profesoro Querino, el Rio de Janeiro, kiu kunludis. Kolonelo Pollen kaj Sro. Richard Sharpe, el Anglujo, kaj Fino. Anaker deklamis Sro. Mann, redaktoro de *Brita Esperantisto*, prezidis.

LUNDON 15^{an}

Diras la *Star*: La Sesa Mondkongreso oficiale malfermiĝis hodiaŭ matene per la solena kunsido, kiu okazis je la 10^a en la granda salonego de la Arlington. Estis vivoplena kaj interesa sceno. La granda ĉambro estis tiel plena, ke multaj samideanoj devis stari. Laŭta akklamado aŭdiĝis kiam eniris Dro. Zamenhof, la amata Majstro. Tuj lin sekvis Kapitano Perogordo, el Hispanujo, kiel reprezentanto de la Prezidinto de la Kvina Kongreso en Barcelono; Dro. Mybs, kiel reprezentanto de la Prezidanto de la Konstanta Komitato de 1^a Kongresoj, Generalo Sebert, kaj de la Prezidanto de la Akademio kaj Lingva Komitato, Rektoro Boirac; Sro. Edwin C. Reed, Sekretario de la Kongresa Komitato; kaj Sro. Gabriel Chavet, Sekretario de la Konstanta Komitato de 1^a Kongresoj.

Sur la estrado jam sidis multlanda kaj pitoreska kompanio, konsistanta el la oficialaj reprezentantoj de la diversaj registaroj, la diverslandaj vicprezidantoj kaj delegitoj, inter kiuj videblaj estis diversaj oficiroj, kaj du Ĥinoj en nacia kostumo.

Post kiam Kapitano Perogordo formale malfermis la kunsidon, Dro. Hale, reprezentante Sron. John E. Barret, Ĉefon de la Internacia Oficejo de la Amerikaj Respublikoj, oficialan Prezidanton de la Sesa Kongreso, diris esperante al la kongresanaro kelkajn korajn vortojn de bonveno en Usonon.

Dro. Yemans, vicprezidanto de la Kongreso, legis telegramon de Sro. Barrett, kiu bedaŭris, ke la devo lin malhelpas persone partopreni, kaj invitis la ĉeestantan samideanaron al solena akcepto merkredon vespere en la salono de la Internacia Oficejo, kiam li povos mem saluti ilin. Dro. Mybs tiam paroladis kaj esprimis bedaŭron pri la foresto de Generalo Sebert kaj Rektoro Boirac, kaj faris proponon — akrame akceptitan — ke la Kongreso sendu al ili telegramojn pri manko de la grandegaj servoj, kiujn ili dum la pasinta jaro faris al Esperanto per sia sindonema laborado.

Sro. Chavet nun faris la kontentigan sciigon, ke la Sesa superis ĉiun ĝisnunan Kongreson pri la nombro de Registaroj reprezentataj, entute dekunu; t. e., Brazilo, Gvatemalo, Ĥinujo, Hispanujo, Honduro, Kosta-Riko, Meksiklando, Persujo, Rusujo, Urugvajo, Usono (Armeo, Maristaro, kaj Internaj Aferoj). Ankaŭ la ŝtatoj Sud-Karolino kaj Florido sendis oficialan delegiton.

Speciale kurioza por la aŭskultantaro estis la parolado, kiun faris Ĥinalingve la ambasadoreja sekretario Lu Ping Tien. Sro. Mello Souza sciigis, ke la Brazila registaro jam en Esperanton metis

afiŝojn en la publikaj telegrafejoj kaj telefonejoj. Kapitano Perogordo diris, ke la Reĝo Alfonso XIII per persona letero rekomendis la lingvon al sia Ministro de Internaj Aferoj.

Poste Sro. Chavet legis la diversajn salutajn telegramojn ricevitaĵojn. Ili venis el ĉiuj landoj, montrante la veran disvastiĝon de la movado.

Sekvis la solena parolado de la Majstro, kio ĉiujare estas la plej interesa afero de la Kongresoj. Varmega aplaŭdado salutis la multajn trafikajn vortojn, per kiuj la amata Doktoro karakterizis la ĉefajn punktojn de nia lastatempa agado. Efektive la Esperantistaro estas feliĉa havi gvidanton kaj konsilanton tiel modeste saĝan kaj taktan, kiel Dron. Zamenhof. La Majstro esprimis la koran deziron de ĉiu Esperantisto per tiuj vortoj:

«Ni esperas, ke, dank' al nia laborado, pli aŭ malpli frue la tuta mondo similigos al ni kaj fariĝos unu granda homa gento, konsistanta el diversaj familioj, interne apartlingvaj kaj apartmoraj, sed ekstere samlingvaj kaj sammoraj.»

Entute, tre sukcesa kaj promisplena estis la malfermo de ĉi tiu grava Kongreso, kiu sendube multe antaŭenigos la aferon tra la tuta mondo.

Dum la posttagmezo la diversaj naciaj delegitoj faris raportojn pri la movado en iliaj landoj kaj vespere la kongresanoj ĝuis tre agrablan ekskurson per la vaporŝipo *St. Johns* sur nia bela Potomac. Enŝipiĝinte prezice je la sunsubiro, la ekskursanaro dum kvar horoj vojaĝadis laŭ la rivero ĝis Indian Head (Kapo de Ruĝhaŭtulo) kaj reen al la kajo. Ili vidis la Militkolegion, la malnovan vere antikvan monitoron *Puritan*, la noblan kolonian domon de George Washington (Mount Vernon), kaj ĉiujn belaĵojn viditajn per lumo de la luno. Ĉe la antaŭa pinto de la ŝipo flirtis la bela Esperanta standardo, kaj la ekskursanoj kantis la himnon *La Espero* kaj aliajn Esperantajn kantaĵojn kaj dancis harmonie al kelkaj Esperantaj arioj.

Oni ĉe la posttagmeza kunsido prezentis al Dro. Zamenhof specialan oran insignon, per Dro. E. C. Reed.

MARDON 16^{an}

Hodiaŭ matene okazis neniuj ĝenerala kunveno de la Esperantistoj, sed anstataŭ tio la delegitoj kunvenis en sekciajn kongresetojn. El tiuj ĉi la plej grava estis la kunveno de la Lingva Komitato, kiun prezidis Dro. Zamenhof mem.

Ĉe tiu ĉi kunveno la plej grava afero estis la legado de la ra-

porto de la prezidanto de tiu komitato, Dro. Boirac, Rektoro de la Dijon Universitato, kiu bedaŭrinde ne povis ĉeesti. Dro. Zamenhof ankaŭ resumis la punktojn, kiujn li diskutis en sia hieraŭa parolado, kaj la komitato pripensis kaj preparolis multe da aferoj rilate la progresadon de la lingvo.

Aliaj okazintaj grupkunvenoj estis respektive la de la Juristoj, Kuracistoj, Fervojistoj, Inĝenieroj, Flegistinoj; Ĵurnalistoj, Liberpensuloj, Katolika Unuiĝo, kaj Instruistoj.

Ĉiuj tiuj ĉi okazis en konstruaĵo «George Washington» Universitato. La kunvenoj tute ne estas oficialaj kunvenoj de la tuta Esperantistaro, sed nur de tiuj personoj, kiuj estas interesitaj pri Esperanto rilate sian propran pensfakon aŭ priokupon. Ĉiu kunveno diskutis la utilecon de Esperanto rilate ĉi tiujn aferojn kaj faris planojn por pli vaste konatigi Esperanton al siaj sampensuloj aŭ samprofesiuloj.

Posttagmeze la kongresanoj ĝuis ekskurson al tiu bela natura vidaĵo, la kaskadoj de la Potomac rivero. En tiu alloga loko ili iom refreŝiĝis post la gravaj laboroj de la Kongreso mem.

Vespere oni prezentis teatraĵon, tradukon el Shakespeare, *Kiel Plaĉas al Vi*, sur la bieno de la Bristol lernejo. La tradukaĵo estas farita de Dro. Ivy Kellerman-Reed, la brila kaj ĉarma edzino de la Sekretario de la Amerika Asocio.

MERKREDON 17^{an}

La kongresanoj estis tre malĝojaj, hodiaŭ matene, kiam oni anoncis en la ĝenerala kunsido, ke pro la bedaŭrinda morto de Prezidanto Montt, el Ĉilo, kiu subite mortis hieraŭ, ĵus kiam li alvenis en Bremen, Germanujo, la invito de Sro. Jhon Barrett al akceptado en la Internacia Oficejo de la Amerikaj Respublikoj estis nuligitaj. La kunsido, tuj kiam oni anoncis la morton de la prezidanto, aprobis decidaĵon, ke la Sesa Kongreso de Esperanto bedaŭras la morton de Prezidanto Montt, kaj esprimas koran simpatian.

Oni anoncis kaj legis telegramon de Prezidanto Taft, kiu dankis al la kongresanoj pro la ricevita telegramo salutanta; kaj siavice sendis al la Sesa Kongreso saluton kaj koran gratulon.

Dro. Mybs legis por Generalo Sebert, kiu pro malsano ne povis partopreni la kongreson, raporton resuman de la Konstanta Komitato. La raporto rilatas al la propono starigi tutan internacian konsilantaron, kies membroj, elektitaj laŭproporcie de la anoj de ĉiu nacia asocio, zorgos pri financaj aferoj de la ĝenerala centra oficejo.

Oni ankaŭ anoncis la akcepton de la invito ricevita el Antwerp, ke la Sepa Internacia Kongreso okazu tie.

Poste, Kapitano Poshnikov, el Rusujo, invitis la Kongreson por Rusujo en 1912^a, kaj Sro. George Warnier, el Parizo, anoncis, ke oni esperas havi la 1914^a Kongreson en Parizo.

Ĝus antaŭ la fino de l' kunsido, Sro. Frank Morrison, sekretario de la «American Federation of Labor» (Amerika Federacio de Laboristoj), mallonge parolis en la angla lingvo. Sro. Mann tradukis. La sekretario promesis lerni Esperanton, kaj opiniis, ke ĝi nekalkuleble valorus kiel komunikilo inter la laborklasoj de l' mondo.

Antaŭ la labora kunsido okazis la tre interesa disdonado de premioj de la Literatura Konkurso. Doktoro Yemans unue prezentis Sinon. Marie Hankel, reĝino de la Literatura Konkurso ĉe la Kvina Kongreso. Ŝi diris kelkajn vortojn, kaj tiam prezentis Dro. D. O. S. Lowell, Lernejestro de la «Roxbury Latin School», Boston, ŝtato Masaĉusetso, kiu disdonis la premiojn. Inter multe da aplaŭdado, la jenaj ricevis premiojn:

Por poezio pri «Universala Frateco»: J. B. Mello Souza, el Brazilo (arĝenta medalo).

Por prozaĵo pri «Universala Frateco»: Fino. Esther Higgs, el Anglujo (arĝenta medalo).

Por originala rakonto: Sro. H. S. Hall, el Cleveland, ŝtato Ohio (arĝenta medalo).

Por originala rakonto skribita de junulo: Sro. Raymond T. Bye, el Germantown, ŝtato Pensilvanio (arĝenta medalo).

Por traktato pri la Utileco de Esperanto en Komerco: Sro. W. S. Vogler, el Hamburg, Germanujo (\$10.00, donacita de la Washingtona Komerca Ĉambro).

Por traktato pri la Biblio: W. L. Church, el Bostono, Mass. (libro donacita de D.ro U. G. B. Pierce, antaŭ nelonge Kapelano de la Usona Senato).

Por traktato pri la Simileco de Zamenhof kaj Lincoln: James Robbie, el Skotlando (la verkoj de Zamenhof, lukse binditaj).

Posttagmeze la kongresanoj vizitis Mount Vernon.

Vespere ili partoprenis neformalan akceptadon ĉe la Arlington.

JAUDON 18^{an}

Okazis kunsido de la Universala Esperanto-Asocio. Pastron Paul F. Hoffman oni elektis prezidi, kaj Sinjoro Mann estis sekretario. La

delegitoj diskutis rimedojn por plivastigi la agadkampon de ĉi tiu grava asocio.

Sro. Leigh Mitchell Hodges, ĵurnalisto, faris plaĉan paroladeton, en kiu li esprimis la esperon, ke dum sia vivtempo okazos, ke tiu, kiu ne povas paroli Esperanton, estos tiel kurioza, kiel nun ŝajnas tiu, kiu povas!

Delegitoj el la diversaj partoj de Nord-Ameriko ankaŭ kunvenis kaj elektis por la nova jaro la jenajn:

Prezidanto, Sro. John Barrett, Bureau of American Republics, Washington, D. C.

Vicprezidanto, Dro. H. W. Yemans, Ĥirurgo, U. S. Armeo, Fort Wayne, Detroit, Mich.

Sekretario-Kasisto, Sro. Edwin C. Reed, Columbus, Ohio.

Konsilantaro: New England, Dro. C. H. Fessenden, Newton Centre, Mass.; New York, Henry D. King, Brooklyn; Eastern, H. W. Hetzel, Filadelfio; Ohio Valley, H. S. Hall, Clevelando; Central, Dro. B. K. Shimonek, Chicago; Southern, Virgil C. Dibble, Charleston, S. C.; Prairie, C. J. Roberts, Omaha, Neb.; Southwestern, E. E. Haynes, Levis, Kan.; Mountain, F. H. Loud, Colorado Spgs., Col.; Western, W. L. Crissey, Portland, Ore.; Capital, James L. Smiley, Anapoliso, Md.

Posttagmeze la kongresanoj ĉeestis la basbalan parkon por vidi konkurson inter la kluboj «Cleveland» kaj «Washington». Oni preparis por la uzo de la ĉeestantoj esperantan libreton pri la reguloj. La «umpire» (decidanto) kelkfoje elparolis siajn decidojn en Esperanto, kio tre gajigis lian aŭdantaron. Ĉeestis ĉirkaŭ 250 kongresanoj, kiuj reprezentis 35 naciojn. Ilin oni grupigis ĉe unu flanko de l' parko sub la verda standardo, kaj ŝajne ili tre interesigis pri nia nacia sporto.

Vespere Sekretario Gabriel Chavet bone parolis kun ilustraĵoj pri urbo Antwerp; Profesoro W. J. Spillman, eminenta scienculo el la Agrikultura Fako de l' usona registaro, pri «Videbla Parolo kiel Helpilo al la Lernado de Esperanto». Prezidanto Barrett neformale akceptis la kongresanojn ĉe la Estrejo de l' Amerikaj Respublikoj.

VENDREDON 19^{an}

Je la matena kunsido Sinjoro Dawe, direktoro de la Suda Komerca Kongreso, prezentis al la kongresanoj inviton okazigi la 1915 Internacian Kongreson en New Orleans, ŝtato Luiziano. Estis disdonitaj en la kunsido du mil ekzempleroj de lia adreso, la esperantan

tradukon de kiu faris Sinjoro Virgil C. Dibble, la tre agema kaj bonkora Konsilanto por la Sudo. La urbo San Francisko ankaŭ estas konkuranto por tiu Kongreso.

Dum la tago, pro la foresto de Prezidanto Taft kaj la Sekretario por Fremdaj Aferoj, la oficialaj delegitoj estis akceptitaj de la Sub-Sekretario de tiu departemento de la usona registaro.

Posttagmeze, la postulantoj por la voĉrajto por la virinoj kunvenis. Doktoro Arnhold, konata bankiero el Dresdeno, Germanujo, prezidis. La ĉefan paroladon faris Sinjorino Marie Hankel, el Dresdeno, Ĉi tiu fama sinjorino estas ne nur fervora propagandistino de la ideo de internacia lingvo, sed ankaŭ arda advokato de l' virinoj pri la afero de egalrajteco kun la viroj. Aliaj, kiuj parolis pri sama temo, estis Sinjoroj W. Kurrie, el West Australia, kaj A. Rudy, el ŝtato Nord-Karolino.

Sekciaj kunvenoj de la poŝtovicistoj, la Teosofistoj, la instruistoj, la financistoj, la vegetarianoj, kaj aliaj kompletigis la laboran tagon.

Vespere, kompreneble oni dancis. Britoj, Usonanoj, Latin-Amerikanoj, Rusoj, Ĥinoj, Hispanoj, Francoj, Kroatoj, Italoj, Germanoj, Poloj, Aŭstralianoj, Hebreoj — popoloj el la plej malsamaj kaj plej malproksimaj regionoj de l' mondo frate intermiksitis. Laŭ kostumo oni povis rekonii ies nacion, sed ĉiuj parolis nur unu saman lingvon — Esperanton; kaj ĉiuj apartenis al nur unu sama frata unuiĝo — la Esperantismo.

La *Post* (ĉiutaga ĵurnalo) diras: «Per internacia lingvo la malsamaj ĉeestantoj akordiĝis, kaj ĉiuj sentis sin tiel senĝenaj kiel en la konsiligaj kunsidoj dum la semajno. La balo estis aparte socia, kaj ĝi estis alia triumfo por la nova lingvo, montrante tre efike ĝian taŭgecon por ĉia uzo. Ifoje la muziko trafe speguligis naciajn trajtojn; tamen la danco *Virginia Ree* kaj la milita melodio de l' Sudo *Dixie* ĉarmis ĉiujn korojn. Estis neeble kalkuli la naciojn, kiuj partoprenis la dancon, tiun malnovan favorataĵon. Ne nur la Nordo kaj la Sudo aplaudis la konatajn karajn kanterojn, sed ankaŭ la Oriento kaj la Okcidento kuniĝis spirite en la ĝojo.»

La plej pentrinda, laŭ kostumo, el la fremduloj ĉeestintaj, estis Kolonelo John Pollen, el la Brita Armeo. Tiu sinjoro estas Irlandano, sed li servis al la Angloj kiel ambaŭ soldato kaj diplomato dum multaj jaroj kaj portas sur la brusto multajn medalojn ricevitaĵajn pro tiu servado. Sinjoro Pollen vestis sin per nigra frako kaj mallonga blanka pantalono, la kapo fezkovrita. Liaj ŝtrumpoj estis blankaj; kaj la tuta kombinaĵo prezentis ideon pri sia epizodplena vivo.

SABATON 20^{an}

Estis nur unu kunsido — dum la mateno. Parolis kelkaj sinjoroj; tiam Dro. Zamenhof solene fermis la Kongreson. La Majstro esprimis sian varmegan dankon al ĉiuj, diris kelkajn kuraĝigajn vortojn pri la movado, — kaj la Sesa jam ne estas. «Ĝis revido ĉe Antwerp!»

Multaj delegitoj tuj ekiris hejmen; aliaj restis en Washington por ĉeesti la vesperan paroladon de Kolonelo Pollen. La paroladinto uzis la anglan lingvon kaj liaj frapantaj frazoj kaj bonaj ŝercoj tre ĝojigis lian aŭdantaron. Kompreneble la temo de la parolado estis liaj spertoj rilate la Esperantan propagandon dum tramonda vagado kaj vizitado ĉe Esperantistaj grupoj. Kiel rezulto de tiuj longaj vojaĝoj, la Kolonelo pli kaj pli firmiĝas en sia fido je Esperanto kaj sia kredo je la fina kaj senkonkuranta triumfo de nia bela lingvo.

Antaŭ nelonge Sinjoro Pollen travojaĝis Aŭstralion kaj Nov-Zelandon. Pri tiu vizito la Aŭstraliaj ĵurnaloj estas dirintaj multe. El la *Banalla Independent* (dusemajna ĵurnalo kun sekcio en Esperanto) ni elĉerpas jenan noton de la Esperanta Klubo en Sydney:

«La Sydneya Klubo daŭrigas progresadi. Anstataŭ ĉiudusemajne, la anoj kunvenas ĉiun mardon, kaj okazas ankaŭ neoficialaj kunvenetoj en la botanikaj ĝardenoj por babilado kaj pro societamo. La vizito de Doktoro Pollen, prezidanto de la Brita Esperanto-Asocio, ekcitis novan intereson pri nia afero. De la tempo kiam la ŝipo alproksimiĝis la kajon, kaj la entuziasmoplena doktoro elpendigis sian verdan standardon, ĝis lia foriro al la stacidomo, kie li propagandis inter la fervojoficistoj, liaj klopodoj estis senĉesaj. Li ĉeestis ĉe nia semajna kunveno kaj faris paroladon, kaj diris vortojn de konsilo al la geanoj, kiuj multe estimis ilin.»

KELKAJ NOTOJ PRI LA SESA

Dudek du eksterlandaj Esperantistoj vojaĝis Usonon per la vaporŝipo «George Washington»; inter ili Droj. Zamenhof, Mybs kaj Pollen. La ŝipa orkestro ludis la Esperantan himnon. Oni ankaŭ preparis menuon laŭ Esperantaj nomoj kaj Sinjoroj Mybs kaj Pollen faris paroladojn; Sinjoro R. Sharpe instruis klasojn.

Aliaj fremdaj delegitoj estis: Sinjoroj H. Arnhold, el Dresdeno; Fernando Burmudez, el Meksiklando; R. Carter, el Durbano, Sud-Afriko; Frederick Chauvreau, el Lavallo, Francujo; Profesoro Cotton, el Parizo; Jules Forestier, el Genevo; M. Nisgor, el Francujo; Cornelius Gottschall, el Gratz, Aŭstrio; Mariano Osmeno, el la Filipinaj

Insuloj; Joseph S. Kurrie, el Kalgorlie, Aŭstralio; Vladisear M. Tabenski, el Litvujo, Ruslando; Felix Vellalo, el Meksiklando; Georges Warnier, el Parizo; Sinjorinoj Giamar, el Nice; Marie Hankel, el Dresdno; Tiard, el Francujo: Fraŭlinoj Kathe kaj Marie Elizabeth Jahns, el Braunschweig, Germanujo.

Mihaelo Pleshe, delegito el Kroatujo, perdis sian monujon kun sia mono en Svisujo, sed la svisaj samideanoj provizis lin je sufiĉe por la vojaĝo al Anglujo; kaj la anglaj helpis lin atingi Nov-Jorkon. Tie kaj ankaŭ ĉe Washington li trovis aliajn oferemajn amikojn.

Ĉeestis la Kongreson ĉirkaŭ 500 Esperantistoj. El tiuj kompreneble la plejmulto venis el la orientaj kaj la mezaj ŝtatoj de Usono. Laŭ nia nuna informo nur Sroj. Lewis, el San-Francisko; William George Adams, el Seatlo; kaj J. C. Cooper, el McMinville, reprezentis la okcidentajn ŝtatojn. La kosto de la vojaĝo malpermesis al ni tiun plezuron.

Ĉeestis la prezentadon de la teatraĵon, *Kiel Plaĉas al Vi*, pli ol mil personoj, la plejmulto Esperantistoj aŭ aliaj, kiuj ekinteresiĝis pri la lingvo. Ili montris la plej grandan entuziasmon. La aktoroj estas artistoj; kaj sub la lerta direktado de Sinjoro Robert Nugent Hickman ili prezentis la belan esperantan tradukon laŭ maniero ricevi koregan aplaŭdadon. Ĝis antaŭ du monatoj, neniu el la Hickman kompanio konis eĉ unu solan vorton de Esperanto! Malgraŭ tio ili bone kaj facile elparolis la esperantajn frazojn, ĝuste tiel facile kiel ili povas paroli la anglajn. Oni starigis la scenejon sur bieno de la «Bristol» lernejo. Post la scenejo staris malgranda arbaro, de kie la aktoroj eniris. La bieno estis lumigata per japanaj lanternoj, la scenejo per kalciaj lumigiloj. La tuto ravis ĉiujn kaj tre plaĉe konformiĝis al la delika imagaĵo kaj ĉarmo de ĉi tiu arbara rakonto de l' amo. Oni diras, ke la talentplena tradukistino nun havas enpresote novan bonan gramatikon.

Laŭ raporto, Doktoro Zamenhof intencas resti en Usono dum kelkaj semajnoj antaŭ ol iri returnen al sia hejmo en Rusujo. Ankaŭ oni diras, ke Sinjorino Marie Hankel vizitos ĉe la hejmo de Sinjoro W. L. Church en Bostono, Mas.

Malgranda grupo da Washingtonaj policanoj lernis Esperanton speciale por uzo dum la kongreso.

Dum la kongreso anonco venis el Francujo, ke la «Franca Aero Klubo» starigis novan regulon, laŭ kiu la petanto por la permeso funkciigi balonojn, aeroplanojn, k. s., devas unue lerni paroli Esperanton!



ĴALUZA MALSANO

Dediĉita al mia simpatia
amikino M. Grau

BELA vespero! La suno sin vestas per ĝiaj plibelaj lumradioj kaj ludetas malkviete sur la klaraj kristaloj kaj sur la agititaj supraĵoj de la fontoj. En la dikeco de l' arboj belega verdeco diras «Printempo».

La du panjoj promenas. La du gefiloj kuras: infano kaj infanino. Ili amuziĝas, saltas, kantas, sin kisas kaj ridas.

Kaj alia infanino de sama aĝo alvenas kaj ekpartoprenas kun ili en iliaj infanaj ludoj. Li apudiĝas kaj salutas ŝin per kiso:— Vi ludos kune kun ni — li diras.

Lia antikva amikineto proksimiĝas al li. Ŝi faras malplaĉan geston: — Mi jam ne amas vin — ŝi diras.

Kaj ŝi iras al ŝia panjo.

* * *

«Tiu kiu ne estas ĵaluza amas senzorge» Tion diris poeto, aŭ filozofa aŭ eble simpla enamiĝintulo. La Amo kaj la ĵaluzo estas, do, samtempaj. Mi aŭdis al iuj amikoj kiuj multe amadis kaj sincere konfesis ke ili sentis multfoje ĉirkaŭtordiĝi en ilia animo la terura ĵaluza vipero.

Kaj Marinjo ankaŭ: Marinjo la infanino kiu en la promenejo foriris kun ŝia panjo ĉar ŝia ludamiketo estis kisinta amikineton je bonveno.

La vizaĝo de Marinjo estas el vakso, flava, kiel esprimo de korpreno, kaj de kolero, kaj de doloro kaj de venĝo. Ŝiaj okuloj montras la neforigeblan signon de senĉesa plorado. Kaj ŝi portas metita en la koro akrapintan dornon kiu iam post iam interniĝas pli kaj pli.

Marinjo mortiĝas. Kio okazas al ŝi? — diras ŝiaj amikinetoj. Mi scias la sekreton. Ŝi suferas ĵaluzan malsanon.

* * *

Marinjo estas ĉarma virineto. Kaj ŝi havas fianĉon. Ĉar estas la unuan fojon kiu ŝi enamiĝis, amfrenziĝas. En la promenejo ŝi vidis lin, kaj tio estas ĝuo por ŝi. Sed ŝi kiu vere amas, volis diveni ri-

gardon de sia amanto al alia deloganta fraŭlino kiu apud li pasis.

— Li rigardis ŝin! Mi vidis ke li rigardis ŝin!

La dorno, kvazaŭ ludspadeto vundas la animon de Marinjo. La ĵaluza mal trankvileco aligas dolorajn kaj kolerajn horojn. Ŝi suferas.

— Mi ĵuras al vi, Marinjo, ke mi nenium amas escepte al vi. Ĉu vi aŭdas? nur al vi.

— Vi rigardis sin. Mi vidis ĝin.

— Tio estas delirioj viaj. Miaj okuloj ridetas kiam vidas vin. Via vizago estas ĝia gloro.

— Kun ŝi vi iris ian tagon...

— Kien? Kiam? Kiel? Vi vin kondamnos pro mensogema. Mia animo estas via.

— Diru ke vi ŝin amas.

— Diru ke vi volas desesperi min. Diru ke vi havas fiebron, ke vi estas freneza... Estas via mia amo. Ĉu vi ĝin kredas?

— Ĵuru tion alifoje.

— Kaj se si volas milfoje.

— Mi ne dubas de vi!...

* * *

Marinjo sola, en ŝia apartamento pensas pri li, pri ŝia bela en-amitulo.

— Jes, li min amas, mi scias ke li min amas... Li ĵuris tion al mi! Mi legas tion en siaj okuloj!... Sed tiun tagon li iris kune kun tiu alia fraŭlino. Mi ne scias se ŝia akompananto estis li. Mi kredas ke jes. Ne. Kaj en la promenejo li rigardis ŝin. Mi ne vidis ĝin bone. Ŝajnas al mi ke li rigardis ŝin. Certe li amas pli tiun fraŭlinon ol min! Mi scias ke li ŝin amas! Fi! Ve!

* * *

— Kiu estas tiu fraŭlino, kies okuloj estas ĉagrenaj kaj la vizaĝo kvazaŭ vakso, tiu kiu similas malfortan rozon velkiĝonta baldaŭe per la mortventego?

— Ĉu tiu vi demandas? Ŝi estas la ĵaluzmalsanino.

ARTUR TORNÉ

★ ★ ★

LA PAPILIO

IAM estis papilio kiu flirtis sur floroj. Infaneto ĝin ekvidis kaj ĝin juĝis tiel belegan ke li volis ĝin kapti kaj tial, li tuj ekpersekutis ĝin.

Sed ĉiufoje kiam la infano alprosimiĝis al la papilio, ĝi sin levis tra la aero kaj forflugis.

«Ho! lasu ĝin, kara infano» al li diris lia patrino; lasu ĉi-tiun papilion kaj kontentiĝu vidante ĝin tiel feliĉan kaj liberan; ĉar se vi ĝin tuŝus, ĝi perdus sian belecon kaj ankaŭ vi perdus la plezuron de viaj okuloj,

La infaneto estis obeema; li obeis la patrinon kaj ĉesis persekuti la belegan papilion, kiu tuj sidiĝis sur florplena branĉo de vastkorpa kreskaĵo.

Ĝi estis flava papilio gracie festona, brile pluŝa kaj ornamita per emajlaj ruĝenigraj punktetoj, kaj disĝutita per blankaj makuletoj perlosimilaj.

Ĝi havis kvar flugilojn kiuj estis tiel malpezaj ke ilia ekmovo, kvankam tre rapida, ne kaŭzis ian ajn bruon. Dum sia flugado, ĝi havis siajn piedojn fleksitaj laŭlonge de sia korpo; sed kiam ĝi ie restis, tiam ĝi ilin montris kaj tial, la infaneto povis kalkuli al ĝi tri ĉe ĉiu flanko.

Poste, li ekvidis ke ĝi malfaldis delikatan rostreton kiel senpeza fadensilko kiun ĝi havis enfaldita je la buŝo, kaj ĝin metis delikate en la kalikojn de la plej freŝaj floroj kie ĝi enspiris ĝian nutraĵon sen nenion difekti.

Sed la papilioj ne povas longe resti en la sama loko. Post kelkaj momentoj ĝi lasis la florplenan branĉon kaj ekflugis tien-ĉi-tien, desegnante tra la aero tre kapricajn zigzagojn kaj saltetante de unu floro la alian kun tia rapideco, ke sia pezo ne kaŭzis al ili plej malgrandan skuon kaj eĉ apenaŭ ilin tremigis.

La infaneto ne laciĝis je tiel ĉarma spektaklo; li ne povis turni de ĝi siajn okulojn; li timis ke la papilio denove ekflugus kaj malaperus.

La dezirego ĝin posedi forgesigis al li la saĝan rekomendadon de sia patrino, kaj momenton kiam la ĉarma papilio sen malkonfido trankvile trinketis sur la kaliko de bela rozo, tiam la infaneto avido ĝin kaptis!...

Atinginte sian celon, li ĝojplena malfermis sian maneton kie li

havis ĝin enkaptita; sed... ho ve! Kio fariĝis la tiel gracia insekto? Delikata orbrila pulvoro kovris la fingretojn de la infaneto, kaj la papilio duone dispremita sin agitis kaj tremigis siajn dispecigitajn flugilojn.

Pro tia ekvido, la sensperta infaneto restis konsternita! Baldaŭ grandaj larmoj malsekigis siajn okulojn, kaj tuj li kuris kaŝi sian ĉagrenon ĉe la brakoj de sia bona patrino, kiu lin vidante tiel dolora kaj tiel penta pro lia malbona agado, ne riproĉis lin; male, ŝi lin konsolis.

Tiel same la homo senĉese klopodas dum sia vivo; li ne laciĝas pro la reserĉado de feliĉoj, riĉecoj kaj honoroj; li konstante bataladas kontraŭ la malhelpaj baroj renkontitaj ĉiupaŝe; sed... ho ve! Tuj kiam ŝajnas al li atingi sian deziritan celon, tiam li ekvidas la senkonsoligan nenion de ĉiaj aferoj.

Kio fariĝis objekto de siaj plej karaj priokupoj, tio nun ŝajnas al li sengusta! seninteresa! senĉarma!!

Tradukis el franca lingvo,

FINO. K. S. (*Katalunino*)



STUDKOMISIO PRI ĈIULANDA VERKARO

(*Sekvo*)¹

FARIĜI HOMO kun la senco FARIĜI GRANDA ALTKRESKA FAMA SERIOZA RESPEKTINDA, k. c. (enlanda esprimo)

Sab. — Mi prunedonis eĉ mian junecon por ke ĝi fariĝu homo kaj por montri ĝin (50) (oni parolas pri pentraĵo).

Orig. — *Que m'he empenyat fins la joventut pera poguer-lo (el quadro) fer home i ensenyar-lo.*

Rap. — ... ke mi elspezis eĉ mian junecon por elfini ĝin kaj ĝin montri.

1) Mallongigoj. — Sab: Teksto de Sro. A. Sabadell. — Orig: Teksto originala. — Rap: Ĝusta traduko laŭ opinio de la Raportinto. — La numeroj montras la paĝojn. (Vidu la numerojn 4^a kaj 5^a.)

Sab. — Ju pli pentraĵojn ci pentros despli per ili ĉi fariĝos homo. (62)

Orig. — *Tant com més quadros vagis fent més home t faras amb els quadros.*

Rap. — Ju pli pentraĵojn ci pentros des pli per ili ci fariĝos fama (aŭ granda).

Sab. — Ke ci fariĝu homo! (73)

Orig. — *Fes-te home!*

Rap. — Ke ci fariĝu fama (granda, grava).

Sab. — Mi faros cin homo per ridoj. (90)

Orig. — *Jo t faré home amb rialles.*

Rap. — Mi vin helpos per ridoj.

Sab. — De la tempo, kiam vi faris el li homon. (101)

Orig. — *De desde que vostès l'han fet home...*

Rap. — De post kiam vi igis lin fama.

INTERESI POR

Sab. — La dorso kaj la kruroj ne interesas por tio! (14)

Orig. — *L'esquena i les cames no compten!*

Rap. — La dorso kaj la kruroj ne enkalkuliĝas! (Laŭvorte).

JALUZIO

Sab. — La jaluzio ne lasas... (102)

JAM (kataluna *ja* = jam, ja, nu!, estas ofte uzata nur por plifortigi la frazon)

Sab. — Mi *jam* tion diros al ŝi. (130)

Orig. — *Ja l'hi diré jo!*

Rap. — Mi mem (tion) diros al ŝi.

Sab. — Jes, mi jam rememoras, mia «*exvoto*». (69)

Orig. — *Sí, me'n recordo, el nostre exvot.*

Rap. — Jes, mi memoras, mia... (?)

Sab. — Ne laciĝu, mi jam vidas, kien vi celas. (71)

Orig. — *No s cansi, que ja veig aont va!*

Rap. — Ne laciĝu, mi bone vidas kien (aŭ kion) vi celas.

Sab. — Mi jam malŝatas tion, sed tiel mi ne devus agi. (101)

Orig. — *No'n ŝaig cas, però hauria de fer-ne!*

Rap. — Mi ne priatentas, sed mi devus priatenti! (Laŭvorte kaj laŭsence.)

JE post pasiva participo

Sab. — Ili estas ĉirkaŭitaj je ĉiaj tentadoj. (21)

KATALANA

Sab. — ... *katalana* (41) (100) (kovriloj).

Rap. — Kurioza rimarko: La radiko katalun' estas uzata de ĉiu enlanda societo, estas titolo de ĵurnalo, kaj ĉie preskaŭ unuanime akceptata. Tamen oni legas en la Vort. de R.^o Boirac: «Katalana» rilata al Katalunujo. Oni havas *ankaŭ* «kataluna». Mi nur renkontis «katalana» en *La Patrino*.

KE

Sab. — Sed mi korpremiĝis, kaj mi havis deziron vidi cin! Ke mi ne povis atendi plu!... (75)

Orig. — *Però estava enguniosa i tenia desitjos de veure-t! Que no m'he pogut aguantar més...*

Rap. — Sed mi estis maltrankvila kaj mi deziradis vidi cin! Nu mi ne povis plu min reteni... (Laŭvorte.)

Sab. — Ĉu kompatinda, ĉar mi havas filon, kiu estos saĝulo? Kiu tia jam estas? Ke en la urbo ĉiuj amas lin? Ke ĉiuj laŭdas liajn pentraĵojn? (78)

Orig. — *Pobra, de tenir un fill que serà un savi? que ja ho es? que a ciutat tothom l'estima? que tothom alaba ls seus quadros?*

Rap. — Ĉu malfeliĉa ĉar mi havas filon, kiu estos saĝulo? kiu tio jam estas?, kiun ĉiu amas en la urbo kaj kies pentraĵojn ĉiuj laŭdas?

Sab. — Kio estas tiu ĉiodoro? — Ke alvenis manĝaĵoj... (64)

Orig. — *Que es aquesta olor? — Que ha arribat vianda...*

Rap. — Kio estas tiuodoro? — Manĝaĵo, kiu alvenis (aŭ: Alveninta manĝaĵo.)

Sab. — Certe mi tion jam scias; sed mi ŝatas pli pentri; kaj ne vivi; ol fari, kion ĉiuj nomas vivadi! Ke mi ne povas fari pli ol mi nun faras! (52)

Orig. — *Això ho sé del cert; però més m'estimo pintar, i no viure per fer lo que tothom ne diu viure. Que no puc fer més de lo que faig?*

Rap. — Tion mi certe scias; sed mi pli ŝatas pentri kaj ne vivi, ol fari tion, kion ĉiu nomas vivi! Ĉu mi ne povas fari pli ol mi faras?

KION MI SCIAS, kun la duba senco ĈU MI POVAS SCII?

Sab. — Patrino, kion mi montros al tiuj ĉi pentristoj? — Kion mi scias, ve al mi! (31)

Orig. — *Mare: però què 'ls ensenyaré an aquests pintors? — Què sé jo, pobra de mi!*

Rap. — Sed, patrino, kion mi montros al tiuj pentristoj? — Ĉu mi povas scii, mi malfeliĉa!

Sab. — Ĉu ci scias, kion mi intencis fari? — Kion mi scias? (51)

Orig. — *No sabs de què 'm van venir ganès? Què sé jo!*

Rap. — Ĉu ci scias, kion mi intencis fari? (aŭ: Kiu deziro venis al mi?) — Mi ne scias!

Sab. — Eble ci ne fartas bone, ĉu okazos io al ci? Kaj kion mi scias! (75)

Orig. — *Que si no estarà bo, que si li passarà alguna cosa, que qui sab!*

Rap. — Eble li ne fartas bone, eble io okazas al li... eble... ĉu mi scias kion ankoraŭ.

Sab. — ... iluziojn je glora koloro kaj... kion mi scias! (87)

Orig. — ... *visions de color de gloria i què sé jo!*

Rap. — ... glorkolorajn viziojn kaj... ĉu mi scias kion ankoraŭ?

Sab. — Kio estas pli dolora por ŝi? — Kion mi scias? (94)

Orig. — *Què es lo que li fa més pena? — Què sé jo!*

Rap. — Kio estas pli dolora al ŝi? — Mi ne scias!

KOMPROMETI

Sab. — Mi ne scias, kiu vin komprometas. (28)

Orig. — *No sé qui 'l fa comprometre.* (La frazo havas de sencojn.)

Rap. — Mi ne scias, kial vi kompromitas la aliajn (aŭ): Mi ne scias, kial vi kompromitas vin mem. (Antaŭ alĝustiĝas al la dialogo.) (Laŭvorte: Mi ne scias, kiu igas vin kompromiti la aliajn, aŭ vin mem.)

KUNULECO

Sab. — ... tiuj, kiuj konante knabinon pli ol ili devus ŝin koni, faris kunulecon kun ŝia patrino. (108)

Orig. — ... *els que, coneixent a una noia més de lo que l'havien de conèixer, feien conxorxa amb la mare!*

Rap. — ... tiuj, kiuj konante knabinon pli ol ili devus koni starigis kunligon kun la patrino!

KUTIMINTAJ JE

Sab. — La pentristoj ne uzas ceremoniojn. Ni estas kutimintaj je ĉio. (37)

Orig. — *Els pintors no 'n fem, de compliments. Estem avesats a tot.*

Rap. — Ni pentristoj ne faras komplimentojn. Ni kutimiĝas al ĉio. (La vera senco estas, ĉar ili rifuzas sidlokon: «Ni estas bone harditaj», aŭ: «Ni estas harditaj per ĉio.»)

KVIETECO

Sab. — Kvietecon! (68)

Orig. — *Calma!*

Rap. — Trankvilon!

LA

Sab. — Ĉu mi ne devas pripensadi, ke mi, la sinjorino Amparo, la vidvino de la Kapitano.., (57)

— Antaŭ ili marŝadas la sinjoro Instruisto. (144)

— Mi jam scias, ke la patrino estas kiel arbo kaj la filoj kiel la frukto. (22)

— La patrino estas prava parolante kiel ŝi parolis. (39)

— Terpomo je la kremo, kun tatara saŭco. (66)

— Kaj Izidro? Kaj la sinjoro Instruisto? (76)

— Kaj la sinjoro Instruisto, mi ne scias kion li komisiis. (77)

LASI AL anstataŭ LASI-N

Sab. — Lasu fari al mi. (32)

Orig. — *Deixa-m fer a mi.*

Rap. — Lasu min fari.

LAŬ

Sab. — Mi ne scias, sed mi multe timas laŭ cia vojo. (21)

Orig. — *No ho se, però m fa molta por el teu camí.*

Rap. — Mi ne scias, sed via vojo multe timigas min. (Tiu ĉi traduko estas laŭvorta kaj ŝajnas al mi tre klara. Kial enuzi «laŭ» kaj en tia stranga maniero?

Sab. — Mi jam tion diros al ŝi: kaj laŭ mi kredas. (130)

Orig. — *Ja l'hi diré jo! I li diré a la meva manera!*

Rap. — Mi mem tion diros al ŝi! Kaj mi diros miamaniere. (Ankaŭ tiu ĉi traduko estas laŭvorta. Kial do, «laŭ mi kredas»?

LUIGI, kun la senco LUPREZI kaj LUDONI

Sab. — Mi ŝuldas la ĉambran luigon. (53)

Orig. — *Devem el lloguer.*

Rap. — Ni ŝuldas la luprezon (de la cambro).

Sab. — ... ĉar mi ne luigas la korpon... (115)

Orig. — ... *es que no m'he llogat el cos...*

Rap. — ... ĉar mi ne ludonis mian korpon...

LULILIS

Sab. — Kaj mi lulilis cin, kaj lulilante cin... (142)

Orig. — *I t breçava, i tot breçante...*

Rap. — Kaj mi luladis cin kaj lulante...

MARTIRAJ

Sab. — La martiraj amikoj... (60)

Orig. — *Els amics martirs...*

Rap. — La amikoj martiroj... (en la okazo kiam la frazo estos tradukebla).

MUELILO

Sab. — Ke ĉe ni flaris, kvazaŭ ĝi estus muelilo. (99) (vidu flari)

Orig. — *Que a casa feia flaire de moli.*

Rap. — Ke nia hejmo odoris, kiel muelejo.

MULTE, MULTO

Sab. — Multe ja estas la diferenco = Certe ĝi estas multe. (115)

Orig. — *No n'hi ha poca de diferencia! I tanta si n'hi ha!*

Rap. — Ne estas malgranda la diferenco! = Efektive, ĝi estas granda.
(aŭ multa)

Sab. — Multo da gajaj vilaĝanoj eniras en la vendejon. (144)

Orig. — *Entra una multitud alegre a la botiga.*

Rap. — Gaja popolamaso eniras en la butikon. (Laŭvorte)

NAŬZIGI AL

Sab. — Ci naŭzigus al mi! (118)

Orig. — *Em faries fàstic!*

Rap. — Ci naŭzus min!

NE EĈ en neo frazo

Sab. — La arto ne akceptas havi serajlon ne eĉ por la plej junaj korinklinoj. (54)

Orig. — *L'Art no admet tenir serrallo, ni per a les afeccions més pures.* (Nekomprenebla frazo).

Rap. — La Arto ne permesas havi serajlon, eĉ por la plej puraj korinklinoj.

(Daŭrigos.)



ELĈERPITAJ SCIIGOJ

Unu el la plej eminentaj kaj plej fruktodonaj polaj verkistinoj, Eliza Orzeszko, mortis la lastan Majon. Ŝi estas konata de la ĉiulandaj esperantistoj danko al Dro. L. L. Zamenhof, Fro. Kabe, kaj aliaj. Ŝiaj verkoj *La interrompita kanto*, *Marta*, *Bona Sinjorino* kaj *A. B. C.* estas el la plejmultaj legataj kaj adorataj de la esperantistaro. Per ŝiaj multenombraj verkoj ŝi celis servi al la patrujo kaj al sia nacio, kaj ĉiuj estis inspiritaj de plej noblaj kaj grandanimaj sentoj, kaj de plej varma koro. Ŝi estis la unua emancipantino en Polujo, kiu danko al sia grandega talento antaŭ enpuŝis la virinan movadon. Ni bedaŭru ŝian morton!

*

La klera esperantisto Sro. V. Inglada Ors, estas elektita akademiano el la Lingva Komitato, laŭ balotado. Ni varme gratulas nian samideanon.

*

Okazis en Augsburgo la 1^a Kongreso de Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio. El raporto de la Sekretario de la T. E. K. A., ni sciigas ke ĝi havas preskaŭ 700 anojn. Aliĝis ĉirkaŭ 200 dum la lasta jaro. Pripensante ke la plej granda nombro el ili estas izolitaj kuracistoj oni povas pretendi, ke la disvolvigo de T. E. K. A. estas bonega. 110 kolegoj reprezentas ĝis nun la Asocion kaj konsile kaj fakte helpas ĉiujn petantajn esperantistojn kaj neesperantistojn. La T. E. K. A. nur ekzistas de post 3 jaroj, oni do povas esti kontenta! Oni elektis Anverpenon kiel lokon de venonta dua Kongreso.



UNUA KONGRESO DE "U. E. A."

EN AUGSBURG (BAVARUJO)

(28 Julio — 3 Aŭgusto 1910)

Nur de du jaroj ekzistas nia Universala Esperanto-Asocio (U. E. A.) kaj jam nun ĝi enhavas pli ol 8,000 membrojn, kaj Delegitojn en 850 urboj de la tuta mondo. Neniel ni esperis, ke ĝi tiel rapide, senhalte kaj mirige disvastiĝos; sed ĝia vere praktika konstitucio, ĝia utileco kaj neceseco ne nur por Esperantistoj, sed precipe ankaŭ por la neesperantista internacia komercistaro kaj vojaĝantaro nepre garantias al ĝi grandiozan estonton. Laŭ la statuto U. E. A. regule kunvenas dum la ĉiujaraj esperantistaj kongresoj. Sed ĉar tiun jaron la kongreso okazas en Ameriko, la Asocia Komitato decidis aranĝi specialan kongreson por U. E. A. en eŭropa urbo.

La fervora Esperantistaro de Augsburg afable invitis nin organizi la kunvenon en sia urbo, kien samtempe estis kunvokitaj la kongresoj de Germana Esperanto Asocio kaj de la Tutmonda Kuracista Asocio. La invito danke estis akceptata kaj en la lastaj tagoj de Julio la Esperantianoj multnombre veturis a la bela kaj gastigema urbo Augsburg.

La 28 de Julio okazis la solena malfermo de la kongreso. La granda salono en la Hotelo «3 Mohren» estis plenigita ĝis la lasta anguleto. Sur la gustoplene ornamita estrado aperas la ĉefurbestro de Augsburg, reĝa kortega konsilanto Wolfram, kaj la Komitato de U. E. A.

Sinjoro H. Bolingbroke Mudie, la prezidanto de l'Asocio, malfermas la kunsidon per afablaj salutparoloj. Poste la ĉefurbestro en la nomo de la urbo Augsburg bonvenas la kongreson per jenaj vortoj:

«Tre estimata kongresanaro, kiel ĉefurbestro de Augsburg kaj honora prezidanto de la esperantistaj kongresoj en nia urbo, mi diras tutkoran bonvenon al la membroj de la Unua Kongreso de U. E. A. Kun granda ĝojo ni preparis en nia urbo gasteman akcepton al viaj kunvenoj kaj ni deziras, ke vi sentu vin hejme inter ni, kaj ke vi forportu el tie bonan rememoron kaj poste plezure povu repensi pri viaj tagoj en Augsburg. Ni precipe deziras, ke tiuj kunvenoj favoru kaj antaŭenhelpu la aferon en ĉi tiu urbo. Kiel centro industriplena, kies produktoj jam dissendiĝas tra la tuta mondo, ni havas tre grandan intereson por la ideo de esperantismo, kaj mi mem persone tre bedaŭras, ke mi ne ankoraŭ povas saluti vin en via komuna lingvo. Sed mi intencas lerni tiun lingvon kaj jam trovis la personon, kiu instruos al mi almenaŭ la elementojn de Esperanto. Kio hodiaŭ jam ne ekzistas, tio povos efektiviĝi morgaŭ. Ĉeestinte la kunsidojn de U. E. A. mi nepre konvinkiĝis, ke Esperanto estas vivanta, bonsona kaj spiritplena lingvo, kiu jam tre disvastiĝis kaj certe havos plenprosperan estonton. Ni ĉiuj estis plej agrable surprizitaj pri la belsoneco de via idiomo, kiu tamen ne celas forpelon de la naciaj lingvoj, sed nur estas mirinda interkomprenilo inter ĉiuj civilizitaj popoloj.

En la espero, ke per via entuziasmoplena laboro esperantismo ĉiam pli kaj pli prosperos, mi ripetas al vi: Estu tutkore bonvenataj en Augsburg.»

En fluega kaj bonstila Esperanto Sro. H. Hodler, vic-prezidanto de U. E. A. alparolas la ĉeestantaron kaj eksplikas la taskon de niaj kongresoj.

Bona festeno dume estis pretigita por la kongresanoj, kaj la unua tago forflugis gaje kaj kontentige.

En la sekvantaj tagoj okazis la sep laboraj kunsidoj, plej lerte gvidataj de S^o Mudie kaj ĉiam tre bone vizitataj de la Esperantianoj. Oni multe laboris. Entuote 26 raportoj pri administraj, financaj, komercaj, junulaj, turismaj demandoj kaj pri multe da pli-malpli flankaj aferoj estis farataj. Ne estas ĉi tie la loko por detale raportoj pri ĉiuj laboroj, iniciatoj, proponoj kaj decidoj. Sed ni nepre devas aldoni, ke la Kongreso dum 7 laboraj kunsidoj diskutadis kaj decidis pri 71 demandoj. Tio certe signifas gravan kaj sukcesplenan laboron kaj denove pruvas, ke U. E. A. estas plej vivoplena kaj progresema entreprenno, kiu sin okupas pri praktika aplikado de nia lingvo.

Flanke de la ĉiutaga laboro la kongresanoj ĝuis kelke da bone organizitaj

plezuroj. Bela vesperfesto kunigis la gajan popolon en la Schiessgraben, granda, belega ĝardeno; dimanĉon la 31 de Julio oni faris ekskurson al Füssen kaj la reĝaj kasteloj de Neuschwanstein; alian vesperon S^o Privat faris impresigan paroladon en Esperanto, kiun ĉeestis ankaŭ multe da ne-esperantistoj. En la granda salono de la Borso S^o Prof. Lederer el Prag publike paroladis pri U. E. A. kaj esperantismo kaj gajnis multe da adeptoj.

La lastan vesperon de la kongresa semajno okazis granda vesperfesto en la Schiessgraben. La festo, al kiu ĉeestis pli ol 500 personoj, komencis per parolado kun lumbildoj pri Klondykela orolando en Norda Ameriko. Ankaŭ tiu parolado estis farata de nia eminenta samideano Prof. Siegfried Lederer el Prag. Poste ni aŭdis belegon koncerton kaj fine la ĉiam gaja junularo — kelkaj tamen ne estas tre junaj — amuziĝadis je dancado.

La Augsburga Esperantiano, kiu tre bone kaj lerte organizis la tutan kongreson, kaj la U. E. A., estis aranĝintaj belegan ekspozicion en granda salono de la Hotelo «3 Mohren» Tiu ekspozicio la tutan tagon estis plena je vizitantoj, ne nur el la kongresanaro, sed precipe ankaŭ el la urbo Augsburg. Esperantia Librejo disvendis siajn librojn, broŝurojn, insignojn, ktp. Alia librejo el Augsburg ankaŭ disvendis librojn, kaj ni aŭdis, ke la aferoj tre kontentige prosperis.

Post la Augsburga kongreso multe da Esperantianoj vizitis Munchenon, kie la tiea grupo estis organizinta promesplenan postkongreson.

Pasigante nun ĉiujn okazintaĵojn antaŭ nia memoro, ni kun granda ĝojo nepre devas konstati, ke la Unua Kongreso de U. E. A. neatendite bone sukcesis, ke ĝi multe helpis kaj helpos al nia movado, ke U. E. A. per tiu kongreso pruvis sian necesecon kaj bonon por la ĉiusecaj internaciaj rilatoj. Ni ne dubas, ke ĉe nia proksimjara dua kongreso U. E. A. ankoraŭ pli forte staros, ke ĝiaj jam nun tre diversspecaj servoj estos ankoraŭ pli bonaj kaj pli ampleksaj, ke nia anaro tiam estos atingita la respektindan nombron da 10,000 membroj. Antaŭen Esperantistoj, amase aliĝu al nia Asocio, jen la vere praktika solvo kaj aplikado de Lingvo Internacia. — Ĝis revido en Antverpeno!

J. SCHMID, L. K.
(Komitatano de U. E. A.)



ENLANDA MOVADO

BARCELONO

Teatra festo. — Por solenigi la datrevenon de la apero de la unua esperanta lernolibro la «K. E. G. Supren...!» organizis teatran feston kiu okazis la 30^{an} de Julio.

Dum la festo estis ludataj la komedioj *Edziĝo malaranĝita* de Sro. Inglada, *Vivu Esperanto!* de nia samlingvano Sro. Cases kaj «I.a renkonto» de



KELKAJ GERONAJ ESPERANTISTOJ DUM LA GERONA ASAMBLEO

S-ino Hankel. En la ludado partoprenis f-inoj Ferrán, Fontanelles. Grau kaj Puig kaj Sroj. Aubeyzón, Grau, Nicolau kaj Puig (J. kaj M.) kiuj estis helpataj de S-roj Renom kaj Piñol.

Al ĉiuj ni sendas nian gratulon pro ilia bonega ludmaniero. Ni ankaŭ same gratulas al la grupo «Supren...!» de kies agemeco ni esperas pliajn efektivigaĵojn.

Ekskursoj.—La esperantista grupo «La Rondo» organizis ekskurSION la 21^{an} de Aŭgusto al Sant Boi del Llobregat, kie la ekskursanoj vizitis la frenezulejon.

La societo «Espero Kataluna» organizis ekskurson la 14^{an} kaj 15^{an} de Aŭgusto al Montserrat. La ekskursanoj faris la iran vojaĝon piede dum la mateno al la unua tago. La sekvanta tago ili vizitis la famekonatan monton kaj revenis Barcelonon per la lasta vagonaro.

La sama societo organizis alian ekskurson la 21^a de Aŭgusto, tra la Tibidabo kaj Vallvidrera kies celo estis viziti societananon tie loĝantan.

Kurso.—La grupo «Liberio», ree invitis la samurbanojn lerni Esperanton en sia sidejo—Mercé, 19 pral.—dum lundo kaj vendredo ĉiusemajne.—LA DELEGITO.

Ekskurso.—La grupo «Barcelona Stelo» organizis ekskurson al la najbara

urbeto Hospitalet kaj samtempe viziton al la fabriko Trinchet. Ĝi okazis en la 28^a de Aŭgusto kaj estis vera sukceso.

En la ekskurso partoprenis, krom la nomita grupo, la sekvantaj: «Supren!», «Universala Frateco», «La Rondo» kaj «Forigu Barojn», ĉiuj el Barcelona, kaj kunvenis ĉirkaŭ ducent gesamideanoj.

Post la alveno al Hospitalet la ĉeestantoj estis salutataj de la urbkonsilantoj Sroj. Arús kaj Estadella kaj la Sekretario de la urbetestraro Sro. Prats, kiuj afable montris al ĉiuj la oficejon de la urbdomo, la elementaran knaban lernejon kaj la halon. En la lernejo faris paroladojn pri nia kara lingvo la samideanoj Serrano, Campdelacreu kaj Gili.

La vizito al la kotona teksika fabriko Trinchet elestis tre interesa. La direktoro de la fabriko Sro. Jozefo Armengol tre kompreneble kaj metode klarigis la malsamajn manipuladojn kiujn eksperimentas la kotono de kiam ĝi eniras en la fabriko ĝis kiam ĝi eliras ŝanĝita en perfektan teksaĵon. La pureco de la grandaj salonoj de la fabriko vokis multe la atenton de la vizitantoj.

La ekskursintoj iris piede ĝis la kvartalo Sans kaj antaŭ la sidejo de la grupo «Forigu Barojn!» kune kantis nian Himnon kaj kriis «Vivu Esperanton!»

En la lasta ĝenerala kunveno de la societo «Paco kaj Amo» oni elektis la jenan komitaton:

Prezidanto: Sro. Paŭlo Perez; *Vic-prezidanto:* Sro. Estanislao Alcover; *Sekretario:* Sro. Ramono Ribas; *Vic-sekretario:* Sro. Francisko Piñol; *Kasisto:* Sro. Enriko Abad; *Kalkulisto:* Sro. Petro Mayol; *Bibliotekisto:* Sro. Kvirecko Redondo; *Voĉdonantoj:* Sroj. Johano Trius kaj Cecilio Ferrer.

Agrabla festkunveno okazis la 3^{an} de Septembro ĉe la grupo «La Rondo», ĝi konsistis el teatra ludado, legado de esperantaj poezioj kaj dancado, gaje finanta la festo.

Geanoj de la grupo prezentis la ŝatindan dialogon *La Ĉiama Kantajo* katalune originale verkita de Sro. S. Rusiñol, esperantigitan de Sro. A. Sabadell; la esperantan monologon *Je la unua horo nokte*, kies esperantan tradukon ni havas dank' al Sro. Campdelacreu kaj la katalunan verkon *Mestre Olaguer* de nia mondfama verkisto Angel Guimerà.

Ĉiuj geaktoraj laŭdinde ĝuis siajn rolojn kaj la multenombra ĉeestintaro, kiu plenigis la teatran salomon, per longedaŭra aplaŭdado ilin premiis; ankaŭ oni aplaŭdis la legantinojn de la poezioj, kiuj multe plaĉis al ĉiuj.

Fine, aro da belaj samideaninoj partoprenis en la dancadon kaj la festo finiĝis plej gaje je la dua matene. Ĝi restos neforgesebla por kiuj ĝin ĉeestis kaj la sukceso de ĝi atingita certe kuraĝigos niajn gesamideanojn de «La Rondo» organizi denove simildajn belegajn vesperkunvenojn.

GIRONA

Sukcese kaj entuziasplene okazis en Girona la 14^{an} kaj 15^{an} de Aŭgusto, la unua provinca Asambleo de gerona'aj esperantistoj, organizita de «Gerona Esperantistaro».

Malgrau la malhelpado liverita de kelkaj esperantistoj, la Kongreson ĉeestis 90-100 samideanoj, kiuj tre interese kaj efike atingis la celon proponitan.

Aŭguston 14^a.—Frumatene la geanoj de «G. E.» kunvenis ĉe la propozidejo por atendi kaj saluti la alvenintajn aliurbajn samideanojn. Je la 11^a matene oni sin direktis al Urbodomo, kunportante la flagojn de la grupoj «Paco kaj Amo» de Palafrügell kaj de «G. E.», kie ili staris dum la du tagoj de la Kongreso.

La salonon de la Urbodomo plenigis inda ĉeestantaro. Lia Moŝto la Urbestro salutis entuziasme la aliurbanojn, dezirante ke ilia restado en la urbo estu al ili tute ĝoja kaj gaja.

Sro. Lusilla, je la nomo de la Organiza Komitato, legis belan spritan leteron de Sro. F. Pujulà Vallès per kiu nia amiko aliĝas al la Kongreso kaj bedaŭras ke iuj samideanoj kontraŭstaru la agadon de la organizintoj de la Kongreso. Plue li bedaŭras ke lia malsano lin malpermesas partopreni en la Kongreso; li gratulas la organizintojn kaj kuraĝigas ilin daŭrigi antaŭen en la de ili entreprenita vojo. Oni aplaudis la kuraĝigan leteron de la kataluna pioniro. Sro. E. Dalmau raportis pri la organiza laboro de la Asambleo, kaj sciigis pri la al la Asambleo aliĝintaj grupoj: ili estas ok krom la «Esperanta Fako» de la «Centre Autonomista del C. y de la I.» de Barcelona, kiun en la kongreso riprezentis Sro. D. Dalmau. Kelkaj el niaj famaj samideanoj ankaŭ aliĝis.

Poste oni elektis la kongresan estraron laŭ la jena ordo: Sro. Arcadi Girona, el Palafrugell', *Prezidanto*; Sro. Ramon Casademont, el Girona', *Sekretario*, kaj kiel *voĉdonantojn* oni elektis ĉiujn riprezentantojn de la provincaj grupoj.

Sro. Canony legis proponon de Sro. Pujulà, kiun oni unanime akceptis. Jen ĝi: «La Asambleo esprimas ĝian bedaŭron pro la konduto de la estraro de la grupo kiun prezidas Sro. Cezaro Huecas, pro tio, ke ĝi klopodis por la malsukceso de la Kongreso; kaj pro tio ke ĝi sendis leteron al lia Moŝto la Urbestro de Girona' celante lin konvinki nei la oficialan protektadon al nia Kongreso. Ĝi-la Kongreso malestimas la ne korektaj esprimoj de la anoj de la grupo kiun prezidas la antaŭnomita sinjoro».

Proponis Sro. D. Dalmau sendi telegramon dankante kaj gratulante al Sro. Pujulà, kaj alia al nia respektinda majstro Dro. Zamenhof. Oni decidis finigi la malferman kunsidon, kaj daŭrigi la kongreson en la morgaŭa mateno je la 9^a.

Samideanoj el Olot', Bagur', Sant Feliu de Guixols', Barcelona', k. t. p., partoprenis en la Kongreso, kaj plie ĉeestis grandnombre niaj gekamaradoj el Palafrügell'.

Posttagmeze oni vizitis la monumentojn kaj belajojn de la urbo; la *Museu*, la *Institut*, la *Catedral*, k. t. p. Oni promenis tra la urbo, oni trinkis freŝajn trinkaĵojn ĉe «Peant» kaj je la vespero oni promenis tra la ĉefa kaj plej bela promenejo de la urbo—la Devesa—kie traŭras multenombre la tuta gironanoj.

Ĉe la «Orfeo Gironí» okazis je la naŭa nokte esperantista festo. Sroj. Amich, Mitjá, Blanch, Dalmau (N.) kaj aliaj legis poeziojn; Sro. Dalmau (E.) ludis monologon, kaj ankaŭ ludis la belan unuaktan dramon de Sro. Pujulà Vallès,

Novelo, fraŭlinoj Dolors kaj Maria Llopart, kaj Sroj. Amich kaj Casademont. La festoalestantaro brue aplaŭdis la partoprenintojn, kaj estis tre laŭdata la kvarteto kiu ludis krom aliaj muzikaĵoj la himnon *Espero*.

Post la finiĝo de la festo oni sin direktis al la societo «El Menestral», kie okazis danco je la honoro de la gekongresistoj aliurbaj.

Antaŭ la ekkomenco de la nokta festo oni iris al la fervoja stacidomo doni la bonvenon al Sro. Prezidanto de «K. E. F.» Dro. J. Bremón Masgrau, kiu iris Girona'n por partopreni la Kongreson je la nomo de nia Federacio.

Aŭguston 15^{an}. — La 9^{an} matenon kolektiĝis en la salono de la urbdomo amaso da geesperantistoj. Prezidis Sro. Arcadi Girona, kaj sidis en la estrarejo Dro. Bremon kaj Sro. Dalmau (D.), el Barcelona'; J. Pi, el Olot'; Gelf, el Sant Feliu de Guixols'; Lusilla, Canony kaj Amich, el Girona'; Sroj. Casademont kaj Dalmau (E.) agis kiel Sekretarioj.

Estis legata telegramo de Sro. Pujulá, kiun oni aplaŭdis. Oni aprobis la raporton pri la unua kunsido.

La temojn pridiskutotaj estis aprobitaj tiele:

1^a Restas starigita «Ligo» de provincaj geesperantistoj.

2^a Tia «Ligo» aniĝas al «Kataluna Esperantista Federacio».

La tria propono pri la publikigo de gazeto, estis eligita de ĝia aŭtoro, kaj oni decidis akcepti la proponon de la «K. E. F.», kiu per Dro. Bremón proponas uzi kiel organon de la Girona' provinca Esperantista Ligo, nian «Kataluna Esperantisto».

Pri la 4^a kaj 5^a temoj proponitaj de Sro. Boix, la Kongreso decidis okazigi la 2^a Asambleon provincan, en Palafrugell', kaj oni elektis komision konsistantan el Sroj. Lusilla, Canony, Amich, Casademont kaj E. Dalmau kune kun alia komisio el la antaŭnomita vilaĝo.

Ankaŭ oni decidis gratuli Srojn Dro. Bremón, Dalmau (D.) kaj lia Moŝto la Urbestro de Girona' pro la de li al la Kongreso liverita kunhelpado kaj pro ilia alesto. Varmajn gratulojn oni donis ankaŭ al Organiza Komitato.

Sroj. Girona kaj Lusilla, dankis la ĉeestantaron kaj partoprenintojn, kuraĝigante ĉiujn daŭrigi semante nian ideon, sub la devizo Amo kaj Espero. La alestantoj aplaŭdis freneze kaj kriis «Vivu Girona', Palafrugell' kaj Dro. Zamenhof!»

Por solenigi la kongreson, kaj samtempe por honorigi la aliurbajn esperantistojn okazis tagmezmanĝo ĉe la *Hotel Peninsular*. Ĝin prezidis Dro. Bremón, kaj sidis ĉe lia dekstra flanko la samideanoj Girona, Casademont kaj Pi; kaj en la maldekstra, samideanoj Lusilla, Amich kaj Dalmau (D.).

Toastis esperante Sroj. J. Pi, je la nomo de la grupo «Olota Stelo»; J. Geli, esperante, je la nomo de la grupo de Sant Feliu de Guixols'; Sro. Blanch, katalune, ankaŭ el Sant Feliu de Guixols. Ĉiuj toastis por la bona harmonio inter la katalunaj esperantistoj, por la baldaŭna konkero de nia celo, kaj por la sukceso de niaj asocioj.

Sro. A. Girona, esperante, dankis la Asambleanojn pro tio, ke ili elektis lin prezidanton de la Asambleo, kaj promesis klopodi senĉese per la triumfo de la venonta.

Dro. Bremón, katalune, diris ke li sentis ĝojon tial, ke li estis inter entuziasmaj kaj junaj samideanoj, sed ke li bedaŭris la decidon okazigi la 2^a provincan Asambleon, pro tio ke ĝi malhelpos la 2^a Katalunan Kongreson kiu okazos en Tarragona' la venontan jaron, sed liaj timoj disiĝis kiam la alestantoj promesis fervore kunhelpadi tian Kongreson. Li bedaŭris plie ke inter la girona'aj samideanoj ekzistu ne harmoniaj interrilatoj, petante ĉiujn ke ili malaperigu la ne simpatiajn sentojn por la bono de ĉiuj. Fine, esperante, li parolis pri nia lingvo kaj pri Dro. Zamenhof, kaj liaj vortoj ŝajnis himno al nia Majstro kaj al Esperanto.

Li devis tuj forlasi la ĉeestantojn por iri al stacidomo, kien lin akompanis kelkaj el niaj samideanoj.

Toastis poste Sro. Dálmau (D.) je la nomo de «Esperanta Fako» de «C. del C. i de la I», el Barceloná'; Sro. Lusillá, legis poŝtkarton de la grupo de Anglès, akceptante ĉiujn asambleajn decidojn. Li dankis kaj adiaŭis la gekongresanojn.

Finigis la tagmezmanĝo per la krioj «Vivu Zamenhof!» «Vivu Pujulá!» «Vivu Palafrugell!» kaj «Vivu Gerona!» Kaj oni disiĝis kaj iris al stacidomoj por adiaŭi la aliurbanojn.

Tiel finiĝis la Kongreso, kiun mi esperas ke ĉiuj memoros ĝoje pro la bona akcepto kaj afekcio de la gerona'aj samideanoj liveritaj. Mi esperas plue ke ĉiuj klopodos por sukcesigi plej baldaŭe tion kion ni stárigis, kaj tion, kion ni akceptis: t. e. nia «Ligo» kaj «K. E. F.» Ni lernu de la kamaradoj de tiu lasta Asocio pligrandigi kaj disvastigi nian nombron, kaj ni sciu kunhelpi ĉiun societon. Ke niaj promesoj ne restu senfruktiĝaj, kaj ili ne restu nuraj vortoj mi plej fide esperas.

Parolado. — Nia senlaca samideano kaj klera esperantisto Sro. Delfi Dalmau en la vespero de la 15^a Aŭgusto faris pri Esperanta paroladon en la salono de la Urbodomo. Estas bedaŭre ke niaj samideanoj ne sentu plian simpatian por la superaj aferoj, kiel unue montris kaj kiel ili montras en antaŭaj okazoj. Estas pro tio ke nia lerta samideano ne povis esti aŭskultata de multaj neesperantistoj. Mi petas korege al miaj urbaj samideanoj ke ni klopodu vekigi niajn tro dormantajn samurbanojn kaj ilin alvarbi al nia celo aŭ almenaŭ vekigi en ili la simpatian por nia afero, ĉu per aparta propagando ĉu per la ĵurnaloj.

La de nia amiko farita parolado ni povas konscizi en tiuj vortoj: ĝi estis bela, konvinkiginda parolado inda de lertulo. — E. GRUARTMONER, *Delegito.*

VILANOVA I GELTRU

Estis granda sukceso por la grupo «Laboro Esperanta» la unua loka Ekspozicio de Esperantaj poŝtkartoj. Ĝi estas enlokigita en la Esperanta lernejo ĉe la «Ateneu». Niaj gesamurbanoj multenombre vizitis ĝin.

Oni sukcesis kunigi milon da poŝtkartoj plejdiversaj, kaj de la plej malsamaj nacioj.

La disdonado de premioj al Esperantaj lernantoj, prezidis la estraranoj de la «Ateneu» kaj ankaŭ la Vilanova' Urbestro.

Sro. Mestres, la unua prezidanto de nia grupo, raportis pri la agado de «L. E.» Li dankis la «Ateneu»-on pro la donaco de la diplomoj, kaj ĝin gratulis pro tio, ke ĝi estas la unua «Ateneu» en Katalunlando kiu entreprenis tian feston.— J. SERRA.

OLOT

Okaze de la unua Girona'a provinca Asambleo, aliris al Girona' nia samideano Sroj. M. Prat, J. Vila, kaj Sro. J. Pi kiel delegito de «Olota Stelo», por partopreni la taskojn de ĝi.

Feliĉe la decidoj aprobitaj de la samideanoj de la Girona'a provinco estas belegaj kaj grandvaloraĵoj por ĉiuj katalunaj esperantistoj, kaj eĉ, precipe por nia nekomparebla amegata «Kataluna Esperantista Federacio». Oni aprobis: fondi provincan Ligon por disvastigi la Zamenhofan lingvon, kaj ĉiujare, por tia celo, efektiviĝi festan ekskurson al ia el la urboj apartenantaj al nia provinco; aliĝi tiu Ligo al «K. E. F.».

Por plene efektiviĝi la celojn de la provinca Ligo, la estroj de la grupoj klopodos kaj penos por ke iliaj kunsoci-tanoj ĉiuj aniĝu al «K. E. F.».

Ĉerte, do, bonsukcesis la Asambleo por la plena organizado de la katalunaj esperantistoj.

Ĉe Olot' oni ankaŭ rimarkis entuziasmon por nia afero, ĉar iuj, laŭ oni min diris, volas ŝirmi sin sub la esperanta standardo. Antaŭen iros la katalunaj esperantistoj; antaŭen iros «K. E. F.».—LA DELEGITO.

REUS

La ĉiujsemajna gazeto *Foc Nou* daŭrigas la publikigon de artikoloj pri Esperanto. La lasta kiun ĝi enpresigis estas subskribita de nia federaciano R. Pallejà.

SABADELL

En la pasinta Julio, oni interrompis la Esperantan kurson donita de la sperta samideano Sro. J. Xercavins, ĉe la oficiala supera lernejo de tiu ĉi urbo.

Tiu kurso en kiu nur ĉeestas la ĝeinstruistoj estis daŭrigata en sama loko —strato Jardí, n^o 4, 1^a et.^o, de post la monato Septembro, ĉiujn sabatojn de la 8^a ĝis la 9^a nokte.

En sama sidejo oni ankaŭ daŭrigis kursojn' de la sama lingvo, haltigita pro somera libertempo, al la lernantoj dezirantaj ellerni tiel belan kiel utilan lingvon. Ĉi tiuj kursoj okazas en ĉiuj semajnaj lundoj, merkredoj kaj vendredoj, de la 5^a ĝis la 6^a vespere. La lerniganto estas la oficiala instruisto, nia federaciano Sro. F. Pujadas, profesoro en la dirita lernejo.

TERRASSA

La ĉi tiea esperantistaro kunvenas du fojojn ĉiusemajne ĉe la grupo «Lumon» kie okazas praktika kurso per Esperanta babilado.

La infangrupo E. J. de L. malfermis kurson por infanoj ĉe «Lumon» ĉe estante pli ol dudek kvin.

Jen la komitato de la grupeto: *Prezidanto*, Josep Girona; *Vicprezidanto*, Lluis Roig; *Sekretario*, Ismael Adell; *Voĉdonantoj*, Bartomeu Rocabert, Jaume Garriga; *Kasisto*, Miquel Baillbé.—LA DELEGITO.

AVIZOJ: Pro troa originalo ni devas prokrasti ĝis la venonta numero la publikigon de respondo al *Enketo*, verkita de nia redaktoro Sro. D. Dalmau.

—De post la venonta numero de K. E. ni ekkomencos raporti pri la *Atilanda movado*.



BIBLIOGRAFIO

Mi raportos pri verkoj nur kiam la redakcio donace ricevos du ekzemplerojn.

Pri la transkribo de la propaj nomoj. «Esperantista Centra Oficejo.» Dokumentaro pri la oficialaj, historiaj, historiaj, bibliografiaj kaj statistikaj aferoj.—Kajero 15. Raporto de Gaston Moch. 1 vol. 91 paĝa.—Prezo: 1 franco.—Paris, rue de Clichy, 51.

Paŝo al perfektigo de Esperanto. Verkita de Sro. Zygmunt Romanski, el Lwow. Kajero 63 paĝa.—Prezo: 1 krono.

Esperantista Murkalendaro por 1911^a. Kunmetita de 28 gcesperantistoj el 16 diversaj nacioj, eldonita ĉe Eldonejo «Espero». Hago (Nederlando.—Prezo ne afrankite: 60 Sd. Ekster Nederlando nur havebla per la ĝeneral agentejoj.

Ni raportos pri ili en venonta numero.



KORESPONDADO

Sroj. J. G., P. A. kaj A. M. Viaj verkoj estos enpresigotaj en venontaj numeroj.—Sro. V. A. Via *idioto* ne estas, bedaŭrinde, perfekte priskribita; iliaj trajtoj ne estas bone desegnitaj kaj li ŝajnas plej bone diboĉulo ol idioto. Alie, la verketo ne estas flue, sed iom peze priskribita.